THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated

INTERNATIONAL LANGUAGE

Vol. XXXII, No. 424/425 AUGUST/SEPTEMBER, 1940

ONCE MORE—B.E.A. CARRIES ON

THE appeals made last autumn for funds for the due prosecution of our work met with a generous and decisive response, and thanks to this support and the prompt renewal of subscriptions for the current year we are in no worse a situation than before, despite an inevitable reduction in trade. One measure leading to this position has been the decision to publish the Journal only once every two months—an arrangement loyally accepted by the Membership—whilst owing to unforeseen circumstances it has been possible to effect other material economies. So for the present we carry on with confidence, knowing that by so doing we are usefully serving not only our Association itself, but also the entire movement, temporarily eclipsed as it unfortunately is to a large extent in Europe as a whole. There is a parallel between the military situation and that of Esperanto: to the British section of the movement has fallen the task of upholding the flag, and of working for the coming day of freedom in the use and spread of the language in a revitalized world.

No special appeal need be made at this juncture, but it can be left to members and friends to continue their support in all possible ways, in full consciousness of the high cause they are privileged to maintain and the immense significance of the effective continuance of our work.

G. D. BUCHANAN, *President*
BERNARD LONG, *Honorary Secretary*

ANTAŬ DUDEK SES JAROJ!

VOĈOJ EL LA PASINTECO

"IN TIME OF WAR, PREPARE FOR PEACE"

At this time of distracting news of warfare and preparations for war on all hands we can find *one* reassuring reflection. "This cannot be a permanent condition. Peace *must* come ; it can be but a matter of weeks or months."

Whether it follow upon conquest and defeat, or come about through absolute exhaustion of the combatants—PEACE MUST ENSUE.

Natural reaction may give us—as we Esperantists most deeply hope—a complete, universal, and *lasting* peace. How necessary then will be the International Language as a means of intercommunication !

But it may be only partial—an *armed* peace. How necessary then will Esperanto be as a means to that education, that ready opportunity for the growth of friendship among the peoples, which shall make further war impossible !

Therefore, in whatever other ways we may be affected, whatever else may be our share of labour and anxiety through the war, AS ESPERANTISTS WE HAVE A PLAIN AND SIMPLE DUTY—to stretch our powers and opportunities to the utmost to ensure the progress, the firm, sure, solid progress of our movement ; to recruit for, and assist in drilling, our "International Army", that it may so grow in numbers and influence as to be able TO RENDER USEFUL SERVICE IN THE CAUSE OF PERMANENT PEACE.

ROBERT ROBERTSON

(*El "The British Esperantist", October* 1914)

KION NI DEVAS FARI?

Necese estas demandi pri nia devo, ne nur kiel Britoj, sed ankaŭ kiel Esperantistoj. Kaj kion ni devas fari, ne nur por progresigi la Esperantan movadon, sed ankaŭ por ĝin utiligi por la bono de la homaro ?

Estas vere, ke la kutima propagando estas nun tre malfacila. La B.E.A. tamen devas sekvi la popularan devizon *Business as Usual*, kaj subteni la Esperantan standardon dum la nuna deviga ĉesigo de klopodoj en aliaj landoj. Tiel ĝi restos kiel nukleo, ĉirkaŭ kiu, ĉe la reveno de paco, la disigitaj naciaj grupoj povos sin reunuigi, kaj preni al si la necesan forton por sia restariĝo. Ĝi devas rigardi la nunan mondstaton kiel kialon por vigleco pli ol ordinara. Siaflanke, la membroj devas klopodi por la financa bonstato de la Asocio, per pagado de kotizaĵoj kaj per pli ol kutima subtenado.

A. HONEYSETT

(*Mallongigita el "The British Esperantist", Okt.* 1914)

PREDIKO ĈE LA ESPERANTA DISERVO, LONDONO, 9 AŬGUSTO, 1914

Kvankam oni kutime ne diskutas politikajn demandojn en Esperantista kunveno, kaj aparte ne en kunveno religia ; ni tamen vivas nun en tempo tiel grava kaj terura, ke mi sentas rajton kaj eĉ devon ilin iom tuŝi hodiaŭ kaj ĉi tie.

Ni staras nun ĉe la komenco de tio, kio eble estos la plej sanga milito, kiu iam malbenis Eŭropon. Ni Britoj nun batalas, ne kontraŭ sovaĝuloj, ne kontraŭ barbaroj, sed kontraŭ unu el la plej alte civilizitaj nacioj de la mondo. Niaj kontraŭuloj estas ne nur niaj kunhomoj ; ili estas proksime parencaj al ni, per raso, lingvo, kaj kulturo. Multaj el ni havas Germanajn boparencojn, aŭ karajn amikojn Germanajn, kiujn ni ne nur respektas, sed sincere amas. Multaj al ni estas konfesantoj de sama religio, servantoj al sama Dio.

Anbaŭflanke troviĝas personoj, kiuj kredas, ke ili batalas por la defendo de sia lando kontraŭ la premo de senskrupula malamiko. En milionoj da hejmoj en ambaŭ landoj oni nun preĝas, ke Dio protektu la forestantan fraton aŭ edzon aŭ filon, kaj donu al li forton kuraĝe batali. Tamen en ambaŭ landoj la plimulto el la popolo, kiel individuoj, maldeziris la militon, kaj volis, se eble, konservi pacon.

Ne estas necese, ke mi provu pentri la mizerojn kaj la terurajn sekvojn de milito. Neniuj vortoj povas tion esprimi. Preskaŭ same suferas, kiel la venkito, tiel ankaŭ la venkinto. Nur la spertinto povas eĉ kompreneti la abomenaĵojn, kiujn milito nepre naskas. Suferas ne nur la soldatoj sur la kampo de batalo ; suferas ankaŭ milionoj da senkulpaj estaĵoj, kaj dum longaj jaroj

poste. Sennombraj gepatroj, infanoj, edzinoj, kaj amikoj, nekonsoleble ploras mortintan amaton, nerevokeble perditan. Longe restas kaj kreskas akra sento de malamo al la nacio, kiu lin mortigis.

Ne decas ĉi tie diskuti, kiu nacio estas kulpa, aŭ almenaŭ pli kulpa, rilate la inferan tragedion ; kaj mi ne intencas tion fari. Ankaŭ ne profitas nun demandi, ĉu la milito estis evitebla. Ni devas akcepti la fakton—la milito ja ekzistas.

Ni ne facilanime riproĉu la registaron. Mi ne povas dubi, ke ĝi ekbatalis nur pro tio, ke ĝi kredis, ke ĝi ne povas fari alie. Ni ne rapidu senkompetente kritiki aliajn. Ja feliĉe por ni estas, ke la ŝarĝo de respondeco pri la decido, ĉu bona aŭ malbona, ne restas sur niaj propraj ŝultroj.

Sed por ĉiu el ni staras la persona demando : "Kio estas mia nuna devo, kiel Kristano, kiel Esperantisto ?" Mi deziras tre humile atentigi vin pri kelkaj devoj, pri kiuj eble estas danĝero de forgeso.

Kvankam ni povas, kaj ja devas, malami la politikon de alia nacio, se ĝi estas nejusta kaj malkristana, ni tamen devas ami la individuajn homojn de tiu nacio. Ili ne estas pli ol ni mem respondaj pri la tragedio. Eĉ se ili estus respondaj, ni devas imiti Dion, kiu malamas la pekon, sed amas la pekinton. Ni en Britujo konvinkiĝis, ke ni batalas por justo kaj libero. Tion mi ankaŭ firme kredas. Sed inter niaj kontraŭuloj estas homoj honestaj, kiuj (prave aŭ ne) vidas la aferon alimaniere, kaj kiuj (ĉu neniam ankaŭ ni ?) tro facile kredas tion, kion oni skribas por ili en la gazetaro. Tre kulpaj estas tiuj, kiuj ambaŭflanke publikigas vortojn mensogajn kaj flamigajn ; kiuj por siaj celoj kaŝas la veron, kaj incitas la pasiojn de la popoloj en malamon reciprokan.

Kontraŭ ĉio, kio tendencas tiudirekte, ni uzu nian tutan forton, per preĝo, parolo, skribo, kaj agado. Ni zorgu, ke ni mem ne forportiĝu en malamon. Ni ne estu tro pretaj kredi ĉion, kion ni legas kaj aŭdas.

Mi aparte deziras peti simpation kaj amikan helpon por la senkulpaj anoj de malamika lando, kiuj nun restas inter ni. Ilia situacio estas malfeliĉa kaj malfacila. Ni traktu ilin amike kaj komprene ; tiel, kiel ni volus, ke oni traktu nin mem en similaj cirkonstancoj. Ni formetu de ni ĉian penson de venĝo aŭ malŝato, memorante, ke ni estas ĉiuj gefratoj, filoj de sama Patro en la ĉielo. Tiel farante, ni estos ne malpli sed pli bonaj patriotoj. Tiel agi estas nia devo kiel Kristanoj, eĉ kiel Esperantistoj. Eĉ de vidpunkto patriota, tio estas nepre la plej saĝa agmaniero. La popolamaso en Germanujo nenion povas nun scii pri la veraj sentoj de nia nacio ; ĝi aŭdas nur la mensogojn truditajn al ĝi por politika celo. Nia nuna sinteno en Anglujo al ĝiaj senkulpaj anoj inter ni—ĉu simpatia kaj ĝentila kaj amika, ĉu ŝovinista kaj malama kaj senracia—tre povos influi la juĝon, kiun la Germana nacio formos pri ni post la milito. Ĉiu amikaĵo, kiun ni nun povas montri al tiuj malfeliĉuloj, estos plua ŝtono por la konstruo de posta reciproka kompreno kaj bonvolo.

Persone mi kredas, kun la Societo de Amikoj, ke ĉia militado estas kontraŭ kiel la litero tiel ankaŭ la spirito de la instruo de Kristo. Mi kredas, ke se tra la tuta mondo ĉiu, kiu sin nomas lia disĉiplo, pli bone komprenus lian instruon, kaj dirus kun la unuaj Kristanoj : "Mi estas Kristano, tial mi ne povas batali", ni estus nun en pli feliĉa stato. Sed pri tio insisti, mi ne rajtas ĉi tie ; kaj mi tre bone komprenas kaj respektas la konvinkojn de aliaj, kiuj malsame kredas.

Ĉu iam venos tempo de universala paco kaj frateco ? Nuntempe ni riskas perdi la kuraĝon, eĉ malesperi ; tiom nula kaj senpova, ŝajne, estas nia longa kaj penega laborado por tiu celo. Sed ni ne perdu la esperon. Ni ja ne estas tiel naivaj, kiel supozi, ke la lingva baro estas la sola, kiu dividas la naciojn. Ni scias tamen, ke ĝi estas unu grava baro, kaj ke Esperanto ĝin forigas. Laborante por Esperanto, ni laboras por la paco de la mondo. Ni faru nian devon, kaj trankvile lasu la ceteron al Dio. Neniu peno estas vere malŝparita. Kiom gravas, se ni mem ne vidas ĝian frukton ? Ankoraŭ regas Dio en la ĉielo. La fina dispono estas en liaj manoj. Ni fidu al li.

Aŭskultu al nia Litova pioniro, Pastro Dombrowski :

> Jes, fine la homaro, je turmentoj sata
> La sangon ĉesos trinki, ĵetos for batalojn,
> Kaj levos la okulojn al la Am' benata,
> Eksoifante kore sanktajn idealojn :
> Kaj la popoloj diros unu al alia
> "Ni estu la amikaj.eroj de l' homaro,
> Kaj la frateca himno de la preĝo nia
> Eksonu jam en unu ĉiukristanaro."

M. C. Butler

(*Mallongigita el "The British Esperantist" Sept.* 1914)

Kaj nun, en 1940, *simile skribas nia samideano P. Ecker, en artikolo en la lasta "Bulteno de la Orienta Mezlanda Federacio" ; kiun ni resumas jene :*

LA NUNA DEVO

Ni ja tro multe aŭdas pri la milito, sed ne povas ĝin ignori. Ĝi tuŝas ĉiujn; kaj aparte nin Esperantistojn, kies celoj estas internaciaj: ĉar ĝi malebligas internacian kontakton, kaj anstataŭigas komprenon kaj kunlaboron per malamo.

Kio do estas nia devo? Pensi larĝe kaj klare estas malfacile, sed ni devas tion celi. Neniun aron da homoj ni kulpigu, kiel sole respondan pri la katastrofo. Ni memoru, ke ambaŭflanke la ordinaraj homoj kaptiĝis en la sama reto. Kia ajn nia sinteno, ni gardu nin kontraŭ malamo, kaj ni serĉu veron kaj komprenon.

Ni Esperantistoj antaŭrigardas al la granda okazo por propagando, kiun liveros al ni la fino de la milito. Sed kiu scias, ĉu tiu okazo efektive venos, aŭ ĉu ĝi estas nur "penso prodezira"? Malgraŭ ĉio, kio devus nin kunigi, ni efektive pli kaj pli dividiĝas. Konstante plifortiĝas la baroj interhomaj, kaj nun la mondon regas naciismo eĉ pli mallarĝa, ol vidis Zamenhof. Kial supozi, ke kun la proklamo de paco nepre leviĝos tajdo da internaciismo? Tre certe venos tutmonda detruo, malriĉo, kaj malsato. Eble ili nin kunigos; tamen tre povas okazi, ke regos ankoraŭ pli forte la naciismo, kaj ke amikeco tutmonda daŭre restos nur poeta revo.

Se ni deziras vidi bonon post la milito, ni devas mem jam nun konstrui la Novan Mondon, dum pereas la Malnova. La horo por agado estas nun, ne iu malpreciza dato en la estonteco. Ni do laboradu por nia idealo, fervore kaj sentime. Nenion ni volu por ni mem kontraŭ la bono de aliaj. La vojo estas kruta kaj malfacila; tamen

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

RECENT LECTURES

June
11, **Southgate.** Round Table.
14, **Woking.** The County Schools.
16, **Witley.** I.F.L.
July
2, **Kingston-on-Thames.** Round Table.
2, **Richmond.** P.P.U.
6 and 27, **Sutton.** Esperanto Group.
9 and 16, **Tolworth.** Dragonfly Fellowship.
18, **Sutton.** Esperanto Group.
22, **New Malden.** Rotary Club.
24, **Dagenham.** Lymington Road S.B. School.
25, **Downham.** Downham Schools.
26, **King's Lynn.** Friends' Meeting House.
Aug.
2–10, **Buxton.** S.B.E.T. Summer School.
2, 3, 4, **Buxton.** Buxton College.
2, **Buxton.** Cavendish High School.
2–9, **Buxton.** Intensive Elementary Course.

The talk at Southgate led to two other invitations. The Sutton Group twice visited the B.E.A. Library, and had two other talks at their meeting-place. The group is obviously in a very healthy condition.

The Woking schools gave us 250 girls and a smaller number of boys. The time was all too short—only one hour; but the children were very bright indeed. The meetings in Richmond and Tolworth were both repeat visits for instruction, by request. In Dagenham 30 boys were examined under the B.E.A. prize scheme.

At the Downham school we had 90 boys and 30 girls. Here 25 boys have formed an Esperanto Club under the capable guidance of their teacher, Mr. H. C. Allen. They wear the star, and some of them already speak quite creditably. A little help to purchase some Edinburgh Dictionaries or other suitable literature would (we imagine) be very welcome here, and put to good use.

The Summer School in Buxton is described on p. 234. Opportunity was taken to arrange an intensive course of six evening lessons to five interested Buxton ladies. It was a real delight to teach such brilliant pupils. They made remarkable progress, and we hope will join the B.E.A. Lectures were given also to 170 boys in Buxton College and 150 girls in the Cavendish High School—two important schools which welcomed us at a moment's notice. At the first we were asked to give additional lessons on the two days following. Other contacts made promise well for a future visit.

SMALL ANNOUNCEMENTS—ANONCETOJ

12 vortoj, 1 ŝil. (5 resp. kup.) Pluaj vortoj po 1p. *Teksto devas atingi nian oficejon, kun antaŭpago, antaŭ la 6a de la monato por la sekvonta numero.*

1d. per word. Minimum 1/– per issue. Prepaid. *Copy must be received at our offices by the 6th of the month for insertion in the next issue.*

Our Bookshelf

Books starred are stocked by the B.E.A. Others should be ordered not from the B.E.A. but from the address given. Postage extra.

***Elektitaj Noveloj**—*Verkis Lu Sin. Eldonis "Orienta Kuriero" kaj "Voĉoj el Oriento", Hong Kong.* 2*ŝ*. 6*p*. *(Ni atendas provizon).*

Ĉi tiu estas la unua volumo de projektita "Ĉina Antologio". Per si mem ĝi ne estas antologio laŭ la kutima senco de tiu vorto, ĉar ĉiuj dek du noveloj en ĝi estas verkitaj de unu homo, Lu Sin, kies bildo aperas sur la kovrilo. Lu Sin estas unu el la plej famaj ĉinaj verkistoj de nia jarcento. Li verkis per la popole parolata ĉina lingvo anstataŭ per la antaŭe ĉiam uzita ekskluziva aristokrata klasika lingvo. Du el liaj verkoj: *La Vera Historio de A Q*, kaj *Kung I Ĝi*, jam aperis en Esperanto.

Lu Sin naskiĝis en 1881, kaj vivis malĝojan vivon en Ĉinujo, lando fendita de internaj feŭdoj kaj premita de fremdaj imperiismaj potencoj. Li mortis en 1936, ne ĝisvivante la unueciĝon de la lando sub la minaco de la Japanaj invadantoj.

En la noveloj de Lu Sin speguliĝas la suferoplena vivo de lia popolo. Nescio kaj superstiĉo ĉe la regatoj; korupteco kaj egoismo ĉe la regantoj—tia estis la mizera stato de antaŭmilita Ĉinujo. Sed ĉie tra tiu barbareco kuras la fadeno de la homeco de la Ĉina ordinarulo, kiu multrilate—en sia amo por siaj parencoj, sia serĉo por sekureco, kaj sia preteco helpi aliajn—similas al ni mem.

Inter la plej bonaj el la noveloj en ĉi tiu volumo estas *La Taglibro de Frenezulo, Medikamento, Morgaŭ,* kaj *Funebro pri l'Pasinteco.* La unua estas la sola, kiu laŭ enhavo povus esti verkita de Eŭropano. La frenezulo, kiu imagas ke ĉiuj homoj estas kanibaloj, povus certe esti trafata de tia iluzio en moderna Eŭropo. *Medikamento* pentras la patroamon de superstiĉulo, kiu celas resanigi sian ftizan filon per manĝigo de panpeco trempita en la sango de ĵus ekzekutita politika "krimulo". *Morgaŭ* portretas malriĉan patrinon, kiu devas vidi sian fileton morti antaŭ ŝiaj okuloj, pro nescio lin helpi. *Funebro pri l' Pasinteco* estas la sola amrakonto en la libro. Ĝi temas pri juna paro, kiu provas rompi tradiciajn morojn, kaj pro la forta postviveco de tiuj tradicioj en la subkonscio de la viro . . . ne sukcesas. *Eksedziĝo* majstre pentras la teruran povon pri vivo kaj morto, kiun posedis la pli supraj klasoj en Ĉinujo: decidojn de plialtranguloj akceptis sen protesto eĉ la viktimoj mem.

Sed ne ĉiu rakonto estas tiel malgaja. Kelkaj eĉ estas komikaj. *La Publiko,* ekzemple, pri homamaso, kiu (ĝuste kiel Angla homamaso) ariĝas, por rigardi ion sur la strato; kaj poste disiĝas, eksciinte nenion pri la ĵusviditaĵo. Alia amuza rakonto estas *Rakonto pri la Haroj:* Ĉina "Parohestro de Bray" razas la kapon, por montri sian subtenon por unu politika partio; kaj aliokaze portas perukon, por ŝajnigi, ke li restas fidela al la malnova tradicio de longaj haroj.

Entute la libro estas rekomendinda al ĉiu, kiu estas scivolema pri la orienta menso; kaj al ĉiu, kiu ŝatas boncele satirajn romanojn. Ĝi estas bone bindita; la presliteroj estas tre klaraj, kaj la papero bonega.

Kelkaj (tre malmultaj) preseraroj ne tro ĝenos la leganton: ekz., *jaroj* (*jarojn*) 7; *ĝi* (*ĝis*) 21; *kavikloj* (*klavikloj*) 29; *tra* (*trans*) *lia ŝultro* 76; *postea* (*posta*) 115.

La stilo estas flua kaj bona. Diversloke oni povas diveni la influon de la Rusa aŭ de la Angla lingvo: ekz., *ĝis kiam ili ne mortas* (*ĝis ili mortas*) 128; *lemonado* (*limonado*) 73; *satenaj* (*atlasaj*) 131; *returni* (*reveni*) 120, 123. Ĉe *ke kiom, ke kio, ke kiu* (13, 75, 78), ĉu la superflua *ke* estas Rusaĵo aŭ Ĉinaĵo? Pluaj korektetoj: misuzo aŭ neuzo de *si* 27, 126, 135; *blovitaj* (*blovataj*) 84; *genuo* (*genuado*) 82; *katedralo* (*katedro*) 116; ellaso de adjektivaj akuzativoj 8.

OKI

***Notes on Esperanto Pronunciation.**—M. C. Butler. 4 pp., 3p. Represaĵo, reviziita, de la notoj pri prononco jam aperintaj en nia gazeto. Ĝi provizas respondon al la demandoj pri tiu temo kutime farataj de seriozaj lernantoj.

Paŝoj ĉe Pordegoj.—*Dramo ag Bernardo Ojasono. Tria kaj Kvara Aktoj. Ĉe la aŭtoro, adreso Haimre as. pk., Märjamaa, Estonujo. Prezo ne montrita.*

Jen la lasta volumo el la trio, kiuj kune prezentas dramon 77-paĝan en dialekto propra al la aŭtoro. Pri ĝi ni povas nenion aldoni al tio jam dirita (p. 174).

Skribinte la suprajn liniojn, ni tamen ricevis

Citaĵoj el Gramatiko.—*Verkitas ag Bernardo Ojasono. 16 pp.*

En ĉi tiu verketo la aŭtoro klarigas sian komprenon pri la Esperanta gramatiko; kaj la novaĵojn, kiujn li uzas por ĝin "pliriĉigi", kaj kiujn li (ne ni) kredas uzeblaj sen forlaso aŭ ŝanĝo al la Fundamento. Li ĝin eldonas, "por fari miajn verkaĵojn pli kompreneblaj"!

ESPERANTO IN THE SECONDARY SCHOOL

TWENTY YEARS' EXPERIENCE IN BISHOP AUCKLAND



I have been asked to give a brief resumè of the history of Esperanto teaching in the Girls' County School, Bishop Auckland, during the period of my Headmistress-ship.

The idea of including Esperanto in the syllabus of subjects taught originated with a lady governor (Mrs. Kilburn) who had been a member of an Esperanto Group. When permission to include it in the syllabus was asked from the Board of Education, the matter was put into the hands of Mr. J. Strachan, M.A., H.M.I. for Secondary Schools in the district. As, in the course of his duties, he had continually met with complaints from Modern Language teachers that their work was seriously handicapped by the pupils' ignorance of grammatical terms and usage, he took up with keen interest the idea of teaching Esperanto to entrants in their first term as a means of clarifying in their minds the rudiments of Grammar before they attempted a foreign tongue.

The English tongue itself is very ill-fitted to help, because in it obvious grammatical distinctions are lacking, and inflections and agreements are irregular and meagre.

Under the aegis of Mr. Strachan, Esperanto was taught, experimentally, to entrants for a period of three months (4 lessons per week) during the years 1919 and 1920, with a special grant from the Board of Education. The result was so satisfactory as to justify a continuance of the method. But one point emerged from the experiment, namely, that the full value of this preparatory work was not obtained unless the teacher who was responsible for transition to a foreign language herself knew Esperanto, so as to be in a position to assist the pupils to make full use of the knowledge of grammatical structure which they had achieved.

From experience gained during these two years, Mr. Strachan suggested a more statistical comparison of teaching methods (this time without assistance from the Board of Education). It was as follows :—

There were in the school four Modern Language mistresses, and each year the entrants (70 in number) were divided into four groups, two taking French, two German, the groups in German tending to be the smaller. The experiment, which would cover six years, arranged that each of the four mistresses should teach throughout the full school course from entrance to School Certificate, one group of girls learning Esperanto in their first term, and one group proceeding to a Modern Language direct. Comparison could then be made in the case of each mistress, by means of School Certificate results, as to the merits of the two methods.

Unfortunately for statistical purposes, the groups were originally very small. Further, a railway strike occurring during the experimental period so seriously disorganized traffic (75% of the pupils travel to school by train or 'bus), and with it the attendance of many pupils, that the number of those who reached the School Certificate age in the groups under observation with the normal amount of teaching was too limited to make valuable comparison possible. This was particularly the case with the small German divisions.

From these experiments, however, the following points emerged :—

(1) The Modern Language mistresses, originally rather sceptical, were content to continue the method of beginning all entrants with a period of Esperanto teaching.

(2) The pupils greatly enjoyed this teaching. Some who had already started learning French and disliked it, found a fresh start in that language after their work in Esperanto, a much easier matter.

(3) When called upon to give their own opinion as to the helpfulness (or the reverse) of work in Esperanto, many pupils gave clear and definite statements in its favour.

The teaching of Esperanto, therefore, became a recognized part of the first year's work. Many pupils taught their friends and parents, and many kept up their proficiency in Esperanto so effectively as to be able to take part in the delightful Continental outings organized by the Esperanto Society, although they had discontinued learning Esperanto as a school subject for several years.

Esperanto has in recent years been taught to some of the post-certificate pupils, in a more advanced standard than was possible in their first year, and many have voluntarily presented themselves for examinations. Diploma students from Durham University taking Language courses in the school have frequently been much interested in Esperanto teaching. Some junior Language mistresses have taken up the subject seriously, and qualified themselves by examinations.

Modern Language teaching in the school has always been recognized as of a high standard, and (possibly in consequence) the Board's Inspectors have always shown a friendly interest in the Esperanto work.

It is my personal opinion that the learning of Esperanto on entering the school has been not only beneficial to the pupils as a basis of Language teaching, but that it has also proved very valuable as training in the observation of word forms and derivations, and in logical reasoning on a plane not too difficult for their age.

ALEXANDRA FISHER, D.Litt., M.A.

Esperanto Classes, 1940-1941

In our next issue will appear information concerning all official classes of which details are sent to us (place, day, hour, fee). Up to the date of going to press no information whatever has been received.

As far as London is concerned, the only classes of which we have certain information are those announced to be held at the John Woolman Settlement (see below), and those at the Balham and Tooting Commercial Institute, Tooting Broadway, S.W.17, 6.30–8.30, on Fridays (Elem.) and Thursdays (Conversation). Here the fee will be from 3/9 to 9/– for the year, according to age, with a reduction to anyone taking both classes.

Last year classes were held also at the following L.C.C. Institutes : Bethnal Green Men's Institute, E.2 ; Bow and Bromley Commercial Institute, E.3 ; City Literary Institute, W.C.1 ; Dulwich Literary Institute, S.E.20 ; Islington Men's Institute, N.7 ; Marylebone Commercial Institute, W.1 ; and Shepherd's Bush Old Oak Evening Institute, W.12 ; also at Dagenham and Ilford Literary Institutes, Ealing Technical Institute, and the South West Technical College in Walthamstow. Presumably these will be held this year also, if there is a sufficient enrolment. Classes will probably begin in the week 23–27 September, and enrolment is desirable in the week 16–20 September. The fee will probably vary from 1/3 a term in the Men's Institutes to from 7/6 to 10/– a year in the others. Enquire at the Institutes.

It is the obvious duty of Esperantists to support local classes, by attendance, or by sending recruits.

Course for Teachers and Advanced Students

It is intended to hold a course for Advanced Students on Monday evenings, at the John Woolman Settlement, 21 Roscoe St., E.C.1 (close to Old St. and Moorgate Stations). Time : 6.30–8.30 or 7.0–9.0 as desired. It is proposed to discuss questions of Language, Style, Literature, Class-Teaching, and other subjects of interest to the advanced student and the teacher, and helpful to the candidate for the Diploma and the Licenciate Examinations. In several previous years an attempt to form such a class for serious advanced study has failed from lack of support ; whether it can be held this year depends on the number of students enrolling. **Opening night : Sept. 9th.** An Elementary Class will be held in the same place on Wednesdays. A Canteen and an Air Raid Shelter are on the premises. Instructor : M. C. Butler.

FORTE NI STARU

KIEL titolon por mia artikolo mi elektis la komencajn vortojn de poemo *Al la Fratoj*, kiun verkis la aŭtoro de Esperanto en la fruaj tagoj de nia movado. Nun, post forpaso de duono de jarcento, tiuj simplaj versoj de D-ro Zamenhof enhavas multon, kiu validas por la malfacila periodo nun trapasata.

Regas ankoraŭ nokto sen luno . . .

La nigra ombro de la hoka kruco etendiĝis super la landoj de Eŭropo, kaj en unu teritorio post alia la verda stelo eklipsiĝis. De aliaj landoj, ne invaditaj, ni estas forbaritaj pro la rompo de komunikaj rimedoj. Ĉu en tiaj cirkonstancoj valoras la peno resti en niaj organizoj kaj daŭrigi laboron por nia movado, esence internacia ? Se nia Internacia Ligo eldonos Jarlibron en la venonta jaro, kion ĝi enhavos ?

Ni jam kutimiĝis al Jarlibro, al kiu tute mankas listoj de Delegitoj en pluraj gravaj landoj. Ĉu al la malaperintaj listoj Germana, Aŭstria, Ĉeĥoslovaka, Pola, ni devos aldoni la Danan, Norvegan, Belgan, Nederlandan, Italan, kaj Francan ?

Al la lasta demando la respondo estas, bedaŭrinde, jes. Tamen des pli pro tio, al la unua demando pri restado en niaj vicoj la respondo estas nepre ankaŭ JES. Se en la nomitaj landoj provizore mankas Delegitoj, ni bezonas des pli grandan nombron en la teritorioj, kie Esperanto estas ankoraŭ libera, kaj kie ĝiaj adeptoj havas kontakton kun la Centra Oficejo.

Vi en la urbo, vi en urbeto . . .

Jes, kaj ankaŭ *vi en malgranda vilaĝo* povas fari vian parton, por konservi la strukturon de nia Ligo dum la malfacila periodo. En multaj lokoj en nia lando estas bonaj Esperantistoj sen tasko en la movado ; eble pro manko de loka grupo, por kiu labori, aŭ pro la dummilita neaktiveco de la loka movado. Sendube multaj el ili volonte kaptus okazon por servi en individua rolo. Kia rolo pli taŭga, ol tiu de loka Delegito ?

Mi do invitas tiajn personojn inter niaj legantoj, kiuj konsideras sin kapablaj reprezenti nian Ligon — kaj samtempe B.E.A.—en sia urbo aŭ vilaĝo, ke ili proponu sin por elekto kiel Delegitoj.

La postulataj kvalitoj ne estas tre altaj. Delegito devas posedi nian lingvon sufiĉe bone por povi korespondi kaj interparoli pri ĝeneralaj temoj, kaj li aŭ ŝi devas esti persone prezentinda kiel ambasadoro de nia movado. Almenaŭ dum la milito la laboro certe ne estos arda. Delegito devas esti *Individua Membro* de I.E.L., t.e. pagi almenaŭ la kotizon de Jarlibra Membro, kaj se eble Membro-Abonanto.*

Tiam atendas nin rekompenco . . .

Se la propono interesas vin, skribu al nia Sekretario en Heronsgate por peti formulon, aldonante kelkajn personajn detalojn, kaj, se eble, la nomojn de aliaj samideanoj, kiuj konas vin. Pri via elekto decidos la Administra Komitato de B.E.A., konsulte kun la landa Ĉefdelegito.

Ni, kiuj aliĝis al la Movado post la milito de 1914–1918, ne ĉesis danki al la fervoraj samideanoj, kiuj gardis nian ideon kaj konservis nian organizon dum tiu kriza periodo, por ke ni, kun ilia helpo, povu rekomenci la taskon interrompitan. Same benos vin la generacio, kiu venos al nia standardo post la forbloviĝo de la nunaj nuboj.

FRED WADHAM,
Brita Ĉefdelegito.

*MJ 4/– ; MA 8/– ; plus la B.E.A.–kotizo.

Another Wedding in Esperanto.—Various papers on 29 July reported that a 22-year old German girl, Marie Kraus, who left her country because of the Nazi anti-religious policy and joined the Belgian Red Cross as a nurse, had just been married to Mr. John C. Coleman, a British film actor living in Los Angeles. Mr. Coleman left Holywood after taking part in an Esperantist film there, and he also joined the Red Cross. Both being enthusiastic Esperantists, he finally met Miss Kraus on the Belgian battlefield. They fled together in the retreat across Belgium and France, crossed the Spanish frontier, and were married in Lisbon, the marriage service being read in Esperanto.

Another romantic war-story, if true (and though we have no confirmation we see no reason to doubt it). The fact that the marriage took place in Esperanto is however by no means so extraordinary a thing as the papers imagine. Our records show several such cases. And international marriages in which the parties first met through Esperanto are of course a commonplace. What is really far more extraordinary is the way in which the press seems unable to print the simplest Esperanto sentence without error, and makes no attempt at accuracy. The *News Chronicle*, for example, headed the paragraph **Ili-n Estis Edziginta per Esperanto,** with four errors in three consecutive words. We remember a similar marriage some years ago in St. George's, Bloomsbury, of an English Esperantist, Mr. Jackson Coleman, to a Hungarian lady. The press reported him to have said **Mi bolas** (instead of **Mi volas**) !

HOTELO POR ESPERANTISTOJ

Hampstead Private Hotels Ltd., 14 Fawley Road, LONDONO N.W.6. Komfortaj loĝejoj haveblaj en hejmeca hotelo (Hampstead distrikto) je moderaj prezoj proksime de ĉefa omnibuso, L.M.S., kaj subtera stacioj. Telefonu aŭ skribu al la direktoro S-ro P. Evans (Adr. 14 Fawley Road, LONDONO N.W.6. Tel. HAMpstead 0452). Esperanto parolata. Ekster-Londonaj Esperantistoj estos laŭdezire atendataj ĉe la stacidomo.

REDUCTION IN PRICE !

LEXICON and KAN-U-GO

(Esperanto Editions).

Two Interesting and Instructive Games.

PRICE NOW ONLY 2/- EACH

Postage 4d.

B.E.A., Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

BELA JOE

Autobiografio de Hundo.

Verkita de Marshall Saunders.

Tradukita de J. Blaikie kaj N. Hohlov.

Ilustrita de D. Copeland.

Bela libro tre taŭga por geknaboj kaj komencantoj.

---

310 paĝoj bone presitaj.

Novaj Prezoj :

Bindita 2ŝ. 6p., afranko 4p.
Broŝurita 1ŝ. 6p., afranko 3p.

Mendu ĉe

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO

Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth Herts.

STEP BY STEP IN ESPERANTO

Fifth Edition.

A SIMPLE TEXT-BOOK.

FOR CLASS TEACHING.

FOR HOME STUDY.

FOR STUDENTS OF EVERY AGE AND STAGE.



CONTENTS :

Clear instruction, simple but thorough, on the principle "One thing at a time, and that done well". Practical guidance on pronunciation. Varied reading matter, carefully graduated, consisting of anecdotes, jokes, poetry, problems, and the pick of Zamenhof's *Proverbaro*. Translation exercises from and into Esperanto. Word-building exercises, exemplifying every combination likely to be met. Test examinations at intervals. Questions of varied type for conversational practice. Repetition exercises. Diagrams and tabular summaries. Table of Correlatives. Advice to the Learner. Helps to the Memory. Hints for the Teacher. Vocabulary of words used. Index of subjects. Selection of recommended literature.

Price : Paper 1/6, post 3d.

Published by the

ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Obtainable from the

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

Heronsgate, Rickmansworth, Herts.

"SOMERA LERNEJO" POR INSTRUISTOJ

Sub la aŭspicio de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj, la seminario okazis en Buxton laŭ la plano anoncita. La urbo mem estas ĉiurilate loko ideala. La dek du partoprenantoj (el Anglujo, Skotlando, kaj Kimrujo) estis ĉiuj spertuloj, kun escepto de unu diligenta elementa kursanino instruata de F-ino Strapps. La programo konsistis el prelegoj kaj diskutoj pri Lerneja Korespondo, Kurso en Lernejo Duagrada, Esperanta Versfarado, kaj Basic English; detala studo de *La Knaboj de Paŭlo-Strato* (laŭ enhavo kaj lingvo); kaj senprepara tradukado. Posttagmeze oni ludis aŭ ekskursis; vespere oni kunvenis por neformala babilado en oportuna hotela ĉambro. La vesperajn kunvenojn vizitis ankaŭ lokaj samideanoj. La kursanoj ĝuis unikan okazon por dektaga Esperanta kunparolado, kaj por kune diskuti la problemojn de Esperanta pedagogio. Inter la matenaj kursoj oni trinkis teon, kaj kantis entute pli ol sepdek kantojn el *Kantaro Esperanta*.

Kvankam la anaro ne estis tiel multenombra, kiel ĝi estus en tempo paca, tamen la lernejo sendube estis tre sukcesa. Ĝia gravo konsistas ne nur en la fakto, ke spite ĉion ĝi tamen ja okazis, kaj brile; sed ankoraŭ pli en la fakto, ke ĝi espereble estas la unua el serio da tiaj kursoj, kiuj povos fariĝi tre gravaj por nia movado en la estonteco. Al ĉiu partoprenanto, kaj aparte al F-ino V. C. Nixon, kiu kun la helpo de F-ino Jay tre kompetente ĉion aranĝis, kaj krome gvidis la kurson, plej sinceran gratulon.

En unu-du vesperoj la kursanoj laŭtlegis kaj inter si kritikis proprajn verkaĵetojn. Jen unu, legita de kursanino (la sola neinstruista!).

SEKRETOJ DE SEKRETARIINO

Mi envias la geinstruistojn, ĉar por ili la vivo estas nur daŭra libertempo. Ili nur staras antaŭ klaso kaj laborigas la klasanojn. Do mi kredas, ke eble vi geinstruistoj interesiĝos pri la vivo de iu, kiu vere laboras.

La vorto *sekretariino* estas sinklariga: ino kun aro da sekretoj.

Mi ne tedos vin, priskribante mian preparan edukiĝon. Mi diros nur, ke, enirinte komercan lernejon, mi luktis kontraŭ stenografio, librotenado, komerca Franclingvo, k.t.p., krom aferoj pli subtilaj—ekz., la psikologio de la traktado de oficejestroj. Post unu jaro mi fariĝis plene dresita stenotajpistino. Adiaŭante la lernejestron, mi ricevis de li prelegon pri la graveco de mia estonta laboro. "Estu ĉiam preciza" li diris al mi. "Kaj memoru, ke unu malĝusta vorto en diktita letero—eĉ unu troa nulo—povas naski katastrofon." Do "kun timo kaj tremo" mi komencis.

La unuaj jaroj pasis sen interesaĵoj raportindaj. Oni diktis al mi nur negravajn leterojn pri kontoj nepagitaj. La sola librotenado konfidita al mi pritraktis la posttagmezan teon kun biskvitoj. Mian profundan scion de psikologio mi ne devis utiligi; tamen mi sciis almenaŭ, ke la plej taŭga horo por peti komplezon de la estro venas tuj post la tagmanĝo.

Dum jaroj mi estis sekretario malsupera, kaj envie rigardis la pli aĝajn fraŭlinojn, kiuj sidas en la privata oficejo kaj konstante grumblas pri troa laboro. Ion post iom mi plispertiĝis, kaj fariĝinte pli valora al gravaj komercistoj, mi eniris oficejon pli imponan.

La oficejo malfermiĝas je 9.30; tamen pro tio, ke komforta rapida vagonaro ekiras je 9.17, mi ĉiam alvenas kvaronhoron malfrue. Skribinte mian nomon en la registron, mi iras al la vestejo, kie ĉiuj fraŭlinoj kunvenas por diskuti la tagnovaĵon—dume plibeligante la vizaĝon. Je 10.0 mi malkovras mian maŝinon, aranĝas la florojn, kaj fajlas miajn ungojn.

Proksimume je 10.30 mi eliras, por trinki kafon. Tio okupas eble dudek minutojn, ĉar ni estas tri fraŭlinoj kune, kaj ni devas iomete babiladi. Post la kafo mi sentas min sufiĉe forta por komenci labori—super mia krucvortenigmo. Sed kiam mi tute profundiĝis en krucvorton, subite sonas la telefono. La fraŭlino sidanta proksime de ĝi aŭskultas, kaj malenergie diras al mi "Monty!" (stenografia parolo signifanta "S-ro Montgomery bezonas vin en la privata oficejo"). Mi do lasas la krucvortenigmon, akrigas krajonon, trovas notlibron, ordigas la harojn, kaj, enirinte la sanktejon, respektoplene salutas la Fakestron kaj sidiĝas apud li. Per la amaso da leteroj kuŝanta antaŭ li, mi scias, ke hodiaŭ mi devos multe labori. Tamen en la mateno la leteroj ne estas la plej grava afero. Mia estro deĵoras en sia urbo kiel Aerataka Sentinelo, kaj mi en mia urbo deĵoras kiel unuahelpantino. Tial la parolo temas pri la "flavaj avertoj" ricevitaj en la pasinta nokto, kaj ni babilas sufiĉe longe pri la ĝenerala situacio. Dume la tempo pasas. Fine la estro komencas kolekti siajn paperojn kaj ankaŭ siajn pensojn, foliumas la leterojn, hazarde elektas kelke da bagatelaĵoj, kaj diras al mi "Faru ion pri tiuj!". Per tio mi liberiĝas el la privata oficejo, kaj revenas al mia krucvortenigmo. Oni permesas al ni nur unu horon por tagmanĝo; sed kiam la vetero estas bela, mi kompreneble prenas iom pli, ĉar en Londono oni ja devas profiti ĉiun belan momenton, ĉu ne? Post la manĝhoro mi iom ripozas, kiam (ho ve!) la estro ekhavas la ideon laborigi min denove. Li diktas ĝis la tria, kiam mi ree malstreĉiĝas por tetrinki kaj babiladi.

Refortigite de la teo, mi okupas min per miaj privataj leteroj. Eble mi respondas al skoltinoj, kiuj petis de mi informojn pri Esperanto. Sed ĝuste kiam mi estas elpensinta novan metodon konvinki skoltinojn, ke ilia movado bezonas Esperanton, la telefono denove sonas, kaj voĉo krias: "Monty demandas, kion vi havas preta

(*Al paĝo* 235)

KIEL TRADUKI

Mi volas proponi kelkajn konsilojn pri tradukado, por helpi al vi traduki la "Pecojn por Progresintoj" kiuj aperas en ĉi tiu gazeto ĉiunumere. Kvankam mi tute ne povas pretendi pri kompleteco kaj aŭtoritateco de miaj konsiloj—finfine nur opinioj—mi estas certa, ke ili ne estas eraraj en ĝenerala senco, kaj povos esti helpaj.

Unue mi ne povas tro forte substreki ĉi tion: oni certe devas plene kompreni tion, kion oni intencas traduki. Estas tute neeble traduki frazon ne plene komprenatan. Do serĉu en nacilingvaj vortaroj la signifojn de vortoj dubetaj (Dum ni tradukis mallongan anekdoton antaŭ du-tri semajnoj amiko kaj mi uzis tri Anglajn vortarojn, *Roget's Thesaurus*, du vortarojn Esp-Anglajn, du Angla-Esperantajn, P.V., kaj vortaron de sinonimoj!). Samtempe mi devas memorigi al vi, ke ofte plena kompreno de vorto ne estas ebla sen scio de la kunteksto, ĉar ĉio povas esti modifata de la post- kaj antaŭ-starantaj vortoj kaj frazoj.

Vorto ricevas sian efektivan sencon ne nur el la frazo en kiu ĝi troviĝas, sed el la paragrafo, el la libro, eĉ el la scienco en kiu ĝi estas uzata. Pensu pri "policy" en la fakoj de asekuro, komerco, kaj politiko! Pluan nuancigon ĝi eble ricevus laŭ la kutimoj de la aŭtoro ĝin uzanta.

Tamen studu bone la mallongajn tekstojn donitajn, notante ne nur la signifon de ĉiu aparta vorto, sed ankaŭ ĝiajn rilatojn, gramatikan kaj sencan, al la aliaj vortoj.

Se vi bone komprenas la signifon de la frazo kaj de ĉiu vorto en tiu frazo, esprimu la entenatan penson per Esperantaj vortoj, uzante laŭ eblo la saman stilon kiun uzas la aŭtoro de la originala frazo.

Se la celo de la traduka laboro estas prezenti al la legonto precizan ideon el teknika vidpunkto, ne hezitu ŝanĝi la vortordon aŭ iomete plilongigi la frazon. Se la ĝusta verbo ne venas en la kapon post kelka pensado, provu alian verbon kun modifanta adverbo; por substantivo, alian substantivon kun modifanta adjektivo, k.s.

Se la celo estas prezenti la stilon kaj formon de la originalo, oni devas pli multe zorgi pri la beleco de la vortoj, pri la ritmo de la frazoj, kaj pri la sentoj esprimataj per la kunmeto de vortoj ne ordinare uzataj kune, kaj tiel plu (Legado de la verkoj de bonstilaj verkistoj instruos pri tio per imitindaj ekzemploj). En tiaj frazoj oni povas—sed nur en okazo de vera bezono kaj nur por plibonigo—iomete ŝanĝeti la signifon de la originala verkaĵo, uzante vortojn kiel eble plej proksimajn al la originalaj, sed kiuj havas nuancon pli bonan, pli poezian, pli esprimoplenan, ol havas la vortoj rekttradukaj.

Mi prezentas kelkajn ekzemplojn.

(1) Tradukotaĵo:
That is just what I was thinking of.
Laŭvorte (do erare!):
Tio estas ĝuste, kio mi estis pensanta pri.
Laŭsence (tamen peze):
Tio estas ĝuste tio, pri kio mi pensis (estis pensanta).
Jen kiel mi dirus ĝin, se mi uzus la frazon en konversacio:
Ĝuste pri tio mi pensis.
aŭ:
Ĝuste pri tio sama mi (ĵus) pensis.

(2) Tradukotaĵo:
Shall we cross the road?
Laŭvorte (laŭeble):
Ĉu ni iru trans la straton? (Ne: *iros*).
Mi dirus simple:
Ĉu ni transiru? aŭ *Ni transiru!*

(3) Originalaĵo precize tradukota:
The payment to the employed of a wage adequate to maintain a reasonable standard of life as this is understood in their time and country is of special and urgent importance.
Du eblaj tradukoj:
Estas aparte grave pagi al la dungataj salajron sufiĉan por daŭra kontentiga vivnivelo laŭ la kompreno de (pri) tio en iliaj tempo kaj lando.
Pago al la dungataj de salajro sufiĉe granda por vivteni ilin je nivelo kontentiga, kiel tio estas komprenata en ilia propra tempo (periodo, epoko) kaj lando, estas afero aparte kaj urĝe grava (havas apartan kaj urĝan gravecon).

Pri unu gravega afero ŝajne multaj verkistoj ne sufiĉe atentas. Tio estas la FLUO de la finita frazo. Ĉi tiu konsilo estas aplikebla ne nur al la tradukado sed ankaŭ al la verkado originala. Legu laŭte (ne nur voĉe, sed laŭte) vian finitan verkon. Se ĝi povas flui el la buŝo flue kaj senpene, kaj se viaj aŭskultantoj povas ĝin kompreni sen streĉo de la penspovo, ĝi povas esti bona; sed se neglate ĝi venas el la lipoj, se vi devas heziti, ripeti partojn, stumble paroli, aŭ klarigi la sencon de iu frazero, kredeble ĝi ne estas bona. Jen du ekzemploj, kiuj donas al ni la saman informon; unu estas komplikita, la alia klara. Legu ilin voĉe kaj komparu.

(i) *La ledokovrilon havantan preskaŭ novan donacitan de li al la luanto de lia ĉambro libron iu trovis en la por ĉiu tie intencita rubujo hieraŭ.*

(ii) *Tiun preskaŭ novan libron kun leda kovrilo, kiun li donacis al la luanto de lia ĉambro, oni trovis hieraŭ en la komuna rubujo.*

Jen lasta konsilo: Antaŭ ol komenci tradukadon de kiu ajn speco, estu tute certa, ke vi sufiĉe bone komprenas ne nur la gramatikon kaj vortaron de Esperanto, sed ankaŭ ĝian *spiriton*, ke vi sentas la *vivantecon* de la lingvo. Tiam, kaj ne antaŭe, mi opinias, oni rajtas entrepreni tradukajn taskojn. Tian komprenon kaj intiman scion de Esperanto oni akiras per konstanta uzado de la lingvo, kaj precipe per la legado de modelaj libroj. Do legu, legu, *legadu*; precipe el la verkoj de Zamenhof kaj aliaj fidindaj verkistoj.

Bonsorton en viaj estontaj provoj traduki la "Pecojn"!

V. VERDA

(*De paĝo* 234)

por li". Konsternite mi memoras, ke ĝis nun mi faris precize neniom. Do ĝis la kvina mi furioze laboras, ĉar post tiu horo la poŝta fako ne akceptas leterojn.

Oficiale la labortago finiĝas je 5.30. Tamen tre taŭga vagonaro lasas Londonon je 5.35, do mi devas ŝlosi mian maŝinon iom pli frue—ĉar post longa laborado mi ja bezonas trafi sidlokon.

Jen kiel mi devos plenigadi kvin tagojn en ĉiu semajno, ĝis mi atingos la 55an jaron. Do vi povas kompreni, kial mi envias la geinstruistojn, kiuj nur staras antaŭ klaso kaj laborigas aliajn.

Por fini, tamen, mi konfesas, ke post unu semajno da libertempo kun geinstruistoj, mi ne estos malkontenta esti denove en la oficejo kaj ĝui iom da ripozo.

M. C. GROEN.

KIEL TRADUKI LA VERBON "TO LIKE"?

Tiuj, kiuj asertas, ke en Esperanto ne ekzistas rimedo alia ol **ŝati**, por esprimi la sencon de *to like*, montras per tio, ke ili ne sufiĉe esploris la kapablojn de Esperanto, precipe la kapablojn de la radikoj **am**, **plaĉ**, **simpati**, kaj **vol**.

Oni povas tre bone diri "mi ŝatas pomojn kaj ĉokoladon" (en la buŝo de kuracisto tia frazo estus aparte taŭga), sed la signifo estas, ke laŭ la opinio de la parolanto la nomitaj objektoj havas grandan dietan valoron. Vidu en *Lingvaj Respondoj*, p. 46.

AMI

La Zamenhofa literaturo abunde atestas, ke la kreinto de Esperanto rigardis la verbon **ami** kiel sufiĉe vastasencan, por ampleksi grandan nombron da nuancoj. Krom la interseksa amo ekzistas granda diverseco; en la *Ekzercaro* oni "amas ordinare personon, kiu estas simila al li" (§13); oni "amas **promeni** en arbaro" (§34); oni "amas **turmenti** bestojn" (§33); oni "ne amas **obstinajn homojn"** (§10); en la *Fundamenta Krestomatio* oni amas **vestojn** (19/18), **ĉion kritiki** (65/4), **ke miaj gastoj estu dome** (72/4), **ke oni akurate pagu** (80/7), **disputojn** (83/21), **flari tabakon** (187/5), **frandaĵojn** (195/4); oni estas amanto de **porka sebo** (63/35), **pleŭronektoj** (73/4), **mensogado** (88/6), **legado** (112/36); oni ne amas **sen laboro vagadi** (418/5). Sendube pomoj kaj ĉokolado meritas eniron en tian liston!

PLAĈI

Kiam ni volas esprimi *to like* pri persono, kaj la kunteksto ne montras, ke ni ne parolas pri la pasia senco de **ami**, ni povas plej ofte uzi la vorton **plaĉi**. Al mi ŝajnas, ke **tiu knabino plaĉas al mi** prezentas bonan tradukon de *I like that girl*. Tiel same: "sed kiuj nun al mi ne plaĉas" (F.K.vi/5 de malsupre); "ke ĝi tre al mi plaĉas" (F.K.21/7); "kio la plej multe plaĉis al ŝi" (F.K.37/29); "La plej multe plaĉis al mi la plena je saĝo de la vivo verkoj de W. Cobbett" (F.K.113/3); "la operacio ŝajne ne tre plaĉis al ĝi" (F.K.178/5 de malsupre).

Estus pli bone, se la aŭtoroj de Ang.-Esp. vortaroj, anstataŭ difini la verbon *to like* per la ne ĝusta vorto **ŝati** aŭ la ne tre taŭga vorto **ameti** (kiun mi ne trovis en la verkoj de Zamenhof), dirus simple "*I like that*=**tio plaĉas al mi**: *I like her*=**ŝi plaĉas al mi**."*

La sekvantaj ekzemploj el la *Dua Libro* (1888) montras, ke en la plej frua tempo de la lingvo Zamenhof uzis *plaĉi* en tiu sama senco: "Mi eltrinkis tutan botelon da vino, kvankam ĝi ne tre plaĉis al mi" (p.21). "Tre plaĉas al mi la blueta fumo de l' cigaro, kiun vi fumas" (p.26).

Ĉe *Hamleto* 61/23 Zamenhof tradukis la frazon *Even those you were wont to take delight in* (supozeble sub ĝia Germanlingva vesto) per "Tiu sama anaro, kiu ordinare tiel plaĉadis al vi".

El la 173 ekzemploj de *plaĉi*, kiujn mi kolektis en mia Zamenhofa konkordanco, mi citas nur la sekvantajn, ĉar ili koncernas personojn kaj sekve tuŝas pli intime la demandon diskutatan:

La Rabistoj.	39/11.	Vi plaĉas al mi, Hermano.
	81/18.	tiel vi al mi plaĉas.
	128/9.	Tiel vi plaĉas al mi.
Marta.	159/31.	ŝi plaĉis al mi tuj.
Fabeloj II.	37/35.	vi havas specialan belecon kaj plaĉas al ni.
	57/20.	ni ambaŭ plaĉos unu al la alia.
	97/25.	Ho, kiel plaĉas al mi la nordlanda maljuna gnomo!
	97/27.	Al mi pli plaĉas la junuloj!
	141/14.	La alilandulo tre plaĉas al mi.
Fabeloj III.	91/33.	Kristino al li plaĉis.
Ester	2/9.	La knabino plaĉis al li.

Tiel same ĉe multaj aliaj el la 173 frazoj *plaĉi al* bone respondas al la senco de *to be liked by*.

HAVI SIMPATION

Plej ofte **simpatio** signifas *kunsenton*, kaj inter *kunsento* kaj *liking* ekzistas rilato tre intima. Ekzemple:

Marta.	172/16.	Sinjoro Eduardo havis simpation al mi.
Fabeloj II.	12/35.	via frato ne havas simpation al ni.
	94/18.	la maljunulo ĝis nun ankoraŭ ne havas simpation por tiu lando.

La esprimo **simpatioj kaj antipatioj** bone prezentas la sencon de *likes and dislikes*. Vidu F.K.279/2; 304/24.

*Al mi ŝajnas, ke ankaŭ la akuzativa formo (**al mi**=**min**) estas tre bone uzebla ĉi tie, kvankam ne Zamenhofa. **Ŝi min plaĉas. Ĉu vin plaĉas la vino?** Komparu: **Mi dankas al vi=Mi vin dankas.** Simile: **Mi gratulas (obeas, salutas, servas, similas, vokas) al vi** aŭ **vin.** (Red. B.E.)

VOLI

Kelkajn nuancojn de *to like* oni povas plej bone esprimi per **voli**. *I should like to suggest*: **Mi volas** (aŭ **volus**) **proponi**. *I should like to draw your attention*: **Mi volas** (aŭ **volus**) **turni vian atenton**. *I should not like to undertake that*: **Mi ne volus entrepreni tion**. *As you like*: **Kiel vi volas**. *Come when you like*: **Venu, kiam vi volos**. *Do as you like*: **Agu, kiel vi volas** (aŭ **Agu, kiel vi trovas bona**, aŭ **Agu laŭ via bontrovo**).

GUSTO

He liked the food very much: **La manĝaĵo havis por li tre bonan guston**. (Komparu F.K.70/16.) *She likes him*: **Ŝi lin trovas laŭ sia gusto**. (Komparu *Fabeloj III*. 91/33.) *I like that*: **Tio estas por mi bongusta**. (Komparu *Fabeloj III*. 122/38.)

En la Zamenhofa literaturo mi ne trovis eĉ unu ekzemplon de **ŝati** kun infinitivo.

William Bailey.

WILL FRIENDS PLEASE NOTE!

Any reader who is in touch with foreign visitors, refugees, and foreign troops now in Britain, and willing to advance the claims of Esperanto among them as an easy means of intercommunication, is asked to write to the Office with a view to collaboration in the work. A small sum of money has been put at the disposal of the B.E.A. to assist in this direction, and anyone wishing to take advantage of this should give full particulars of the possible use desired to be made of it, e.g., by way of providing textbooks, etc.

ESPERANTISTS IN THE FORCES

In response to the request for information on p. 217, we have received the following names :—

Atkin, A., Bethnal Green. Training Regiment.
Barnes, C. A., Beckenham. R.A.F.
Borght, C. van der, Letchworth. Gunner, Training Regt.
Dack, C. T., Leigh, Lancs. Royal Corps of Signals.
Farrow, L. A., Colchester. Royal Corps of Signals.
Gregor, D. B., Swansea. Cadet Officers' Training Unit.
Goldsmith, Miss E. C., Rickmansworth. W.A.A.F.
Humphreys, J. H. G., Liverpool. Liverpool Scottish.
O'Connor, C. R. O., Chadderton, Lancs. Sergeant, Royal Artillery.
Salter, Capt. J. R., Enfield. R.E.
Sedgwick, G. R.A.F.
Sleigh, Miss G. B. W.A.A.F.
Spinks, Leslie, Nottingham. Searchlight Battery, R.A.
Wilkinson, R. B., Ipswich and London. R.A.F.
Wright, N. G., Ipswich and Bedford. R.A.F.
Young, C. G., Chester. R.A.F.

KRONIKO LOKA

Balham.—La grupo ne povas regule kunveni, sed la Sekretario, F-ino Borel, 20 Badminton Rd., S.W.12, volonte helpos vizitantojn. (Telefonu Battersea 3208).

Birmingham.—La Ĝardenfesto aranĝita de la Young People's Esperanto Club (p. 210) plene sukcesis. Rezultis profito de £8–8–0, kiun oni dividis inter B.E.A., I.E.L., la Klubo, kaj la Klubunio. Ĉeestis 150. Okazis dancado, flankaj amuzaĵoj, tetrinkado, kaj kantado de la kursanoj de S-ro Barnecutt. Troviĝis diversaj vendobudoj, inter kiuj Esperanta librovendejo. Vespere teatraĵoj verkitaj kaj luditaj de la geknaboj mem, Esperanta ŝarado, k.a. Rimarkinda kaj kuraĝiga ekzemplo.

Ilford.—La grupa bulteno regule aperas, kaj estas modela laŭ stilo kaj intereso.

Lancashire and Cheshire Federation.—Kotizojn kaj monpagojn ŝuldatajn oni sendu al la nova sekretario-kasisto, S-ro Fred Parker, 368 Colne Rd., Burnley. La Kvaronjara Konferenco okazos en Oldham, 28 Septembro.

Londono.—La Londona Federacio okazigos konferencon sabaton, la 14an de Septembro, en Fred Tallant Hall, Drummond St., N.W.1, je 6.0. Oni povas temanĝi antaŭe je malalta prezo en la sama loko. Poste (proksimume je 7.30) oni dancos kaj amuziĝos (kosto: 1ŝ. 3p.)

Somerset and Gloucester.—La loka Federacio eldonas nun presitan Novaĵleteron (kiun kompostas kaj presas nia samideano G. Tordoff). Ĝi enhavas novaĵojn pri la Esperanta movado en la regiono, kiu restas tute vigla. Ni gratulas.

South Wales and Monmouth.—Je 20 Julio la Federacio kunvenis en la Temple of Peace, Cardiff. La Templon ĵus konstruis Lord Davies je kosto de £60,000 el materialoj portitaj el la tuta mondo, kaj ĝi estas unike bela. Nome de la Federacio Kanoniko Harris, parolante Esperante, Kimre, kaj Angle, donacis al la templo enkadrigitan portreton de Zamenhof, kiu okupos sur ĝiaj muroj lokon de honoro inter la pioniroj de paco. S-ino W. J. Edmonds, el Newport, jam donis al la templo bele binditan ekzempleron de *La Vivo de Zamenhof*.

La Federacio ĵus eldonis 500 ekz. de tre trafa propaganda flugfolio *The War—and After*. Ĝi metis afiŝojn pri Esperanto en la ĉambrojn de Y.M.C.A. en Cardiff, kaj la grupo en Barry same faris ĉe la lokaj stacidomoj. Venonta kunveno: Cardiff, en Novembro.

Yorkshire.—La venonta Federacia kunveno okazos 7 Septembro ĉe la Kooperejo, Buxton Rd., Huddersfield. 3.30 Aferkunveno; 5.30 Teo (pri partopreno avizu S-ron Beaumont, 5 Central Close, Fartown, Huddersfield); 6.30 Koncerto.

BRITISH ASSOCIATION OF BLIND ESPERANTISTS

La kvina jara raporto—brajle presita—montras kuraĝigan kaj bravan laboron malgraŭ malfacilaĵoj, inter kiuj eble la ĉefa estas la portempa malapero, pro la milita situacio, de la brajla gazeto *Esperanta Ligilo*. Grandaj perdoj ankaŭ estis la mortoj de F-ino Adams kaj S-ro Keilly. La kaso montras kreditan saldon. La filio en Newcastle estas aparte vigla. Tie D-ro Philipp, blindulo, ĵus gajnis la Diplomon de la B.E.A. kun distingo. La jaran kotizon (1/–) oni pagu al S-ro T. Forster, Cowshill, Bishop Auckland, Co. Durham.

The Esperanto Student

THAT'S THAT

I hope most of my readers are quite certain of the difference between the meanings of the words KE and TIO or TIU or TIA. Any dictionary will give you the meanings of the last three, but a few words are necessary about the first one, KE. All these words have a similar translation in English, namely *that* (*that thing, that one, that kind of*), but their meanings are entirely different.

In English the word *that*, as represented by KE, can often be omitted : *I hope* (*that*) *it won't rain ; I think* (*that*) *he will know ; I knew* (*that*) *you would come.* But in Esperanto you may not omit the KE. The above phrases would be translated into Esperanto thus :

Mi esperas, ke ne pluvos
Mi kredas, ke li scias
Mi sciis, ke vi venos

The word THAT is used above as a conjunction, but we also use this word as a relative pronoun (see the following examples), and here again it may often be omitted in English. In this case it is translated by KIU, and (as in the case of the word KE) we may not omit it in Esperanto. The phrases : *the house* (*which*) *I live in ; the book* (*that*) *you lent to me ; the gifts* (*which*) *they received ; the postcard* (*that*) *you sent me,* should be :

la domo, en kiu mi loĝas
la libro, kiun vi pruntis al mi
la donacoj, kiujn ili ricevis
la poŝtkarto, kiun vi sendis al mi

Try translating these sentences :

I hope you are well
He thinks he is always right (*prava*)
There is the man I met yesterday evening (*hieraŭ vespere*)
She proved we were all wrong
That isn't the hat I bought you
I don't think he is the man I spoke to (*al kiu*)

Remember: there should be a KE or a KIU in each sentence.

PECO POR PROGRESINTOJ

De la lasta Peco por Progresintoj mi ricevis kelkajn bonajn provojn, sed neniun perfektan. Mi esperis, ke mia artikoleto pri la uzado de DE kaj aliaj prepozicioj helpos al vi. En tio, ke neniu misuzis malbone tiun prepozicion, mi trovas signon pri helpo donita de tiu artikolo. Bone ! Tamen neniu provo meritis senŝanĝan preson, do mi publikigos la provon de S-ro J. F. Partington el Southport, kun necesaj ŝanĝetoj :

Dum pasis la jaroj, la folioj estis forpelitaj de la vintraj ventoj kaj anstataŭitaj de beletaj verdaj folioj, kiuj bruliĝis per la varmo de somera suno, poste falis de la branĉoj, kaj estis denove forpelitaj el la arbaroj inter glaciaj ventegoj.

Mi ne intencas prezenti tradukotan Pecon en la nuna numero, sed mi proponas al vi la jenan servon : Se iu deziras sendi al mi leteron aŭ eseeton verkitan originale en Esperanto, aŭ tradukon *kaj la originalaĵon,* mi korektos kaj komentos pri eraroj faritaj—se troviĝos eraroj. Viaj leteroj ne estu tro longaj, alie mi ne havos tempon sufiĉan.

Nepre sendu afrankitan koverton. Alie mi ne respondos. Adreso : pere de B.E.A.

P. E. DA GOGO

DISERVO ESPERANTA

Je 3.0, Dimanĉon, la 8-an de Septembro, okazos Diservo Esperanta en la preĝejo St. Ethelburga, 72 Bishopsgate, E.C.2. Parolos M. C. Butler. Poste okazos la kutima Temanĝo de la Duadimanĉa Rondo, en la hotelo Gt. Eastern, Liverpool St.

ESPERANTISTA GRUPO DE FEDERA UNUIĜO

Federa Unuiĝo estas rapide kreskanta movado, kiu celas la federiĝon de ŝtatoj sub federa registaro, kiel por la konservado de la paco tiel ankaŭ por organizita kunlaborado en aliaj sferoj de komuna intereso. Estas evidente, ke kiam tia federacio estos starigita, estos konsilinde elekti lingvon por la oficiala uzado de la federa registaro. La sama lingvo estos instruata tra la tuta federa regiono, ne por anstataŭi la naciajn lingvojn, sed kiel helplingvo por uzado en ĉiuj komunikaĵoj inter registaroj, komercaj entreprenoj, kaj individuoj.

Opinioj koncerne la elekton inter Esperanto kaj unu el la naciaj lingvoj jam esprimiĝis. Ne estas necese katalogi la multajn kialojn kiuj decidigos ĉiujn Esperantistojn opinii, ke Esperanto posedas pretendon nekontraŭstareblan. Esperantistoj havas "internaciajn mensojn", kaj devus ageme studi la celon de Federa Unuiĝo, helpi diskonigi ĝin, kaj havigi subtenon por ĝi. Tiel ili povos kapti la plej gravan okazon ĝis nun por helpi al la pli vasta akcepto de Esperanto.

Esperantista Grupo de Federa Unuiĝo estas nun starigata, kaj mi invitas vin membriĝi. La grupo studos la federan planon de la lingva vidpunkto, kaj provizos eblecon esprimi la intereson de Esperantistoj pri tiu vasta projekto. Skribu al mi por detaloj. Minimuma kotizo : 1ŝ.

J. H. WESCOTT, 29 Hawkesfield Road, S.E.23.

ESPERANTO AT A GLANCE

ESPERANTO is PHONETIC.

All letters sounded: one letter one sound.

ACCENT or STRESS falls on the second last syllable.

NO IRREGULARITIES. NO EXCEPTIONS.

THE ALPHABET OF ESPERANTO

A a *ah*	B b *bo*	C c *tso*	Ĉ ĉ *cho*	D d *do*	E e *eh*	F f *fo*	G g *go*
Ĝ ĝ *Joe*	H h *ho*	Ĥ ĥ *hho*	I i *ee*	J j *yo*	Ĵ ĵ *zho*		
K k *ko*	L l *lo*	M m *mo*	N n *no*	O o *oh*	P p *po*	R r *ro*	S s *so*
Ŝ ŝ *sho*	T t *toe*	U u *oo*	Ŭ ŭ *woe*	V v *vo*	Z z *zo*		

No Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U have approximately the sounds as in *bar, bear, bier, bore, boor*

C is not sounded like S or K, but like *ts* in Tsar.

J has the sound of *y* in *yes*.

The sounds of ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, and ŝ are heard in *leech, liege, loch, leisure*, and *leash*.

THE GRAMMAR is based upon SIXTEEN FUNDAMENTAL RULES.
THE PARTS OF SPEECH are formed from Root-Words by the addition of appropriate Letters.

O is the ending of the NOUN: fakto, telefono, piano, gluo, fajro, tasko

ADJECTIVES end in **A**: evidenta, longa, granda, freŝa, furioza, simpla

NOUNS and ADJECTIVES form the PLURAL by adding **J** (*aj, oj* sound as in *my boy*)
evidentaj faktoj longaj telefonoj grandaj pianoj

THE SIMPLE VERB HAS ONLY SIX INFLECTIONS.

INFINITIVE.	PRESENT.	PAST.	FUTURE.	CONDITIONAL.	IMPERATIVE.
I	**AS**	**IS**	**OS**	**US**	**U**
ESTI	estas	estis	estos	estus	estu
LERNI	lernas	lernis	lernos	lernus	lernu
INSTRUI	instruas	instruis	instruos	instruus	instruu

N marks the ACCUSATIVE (*direct object*)
Mi (*I*) instruas lin (*him*)
Li (*he*) instruas min (*me*)
Ŝi lernas Esperanton

ADVERBS end in **E**: rapide, entuziasme, diligente

ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

PARTICIPLES used as ADJECTIVES, NOUNS, and ADVERBS:

ACTIVE—	Present -ANT	Past -INT	Future -ONT
PASSIVE—	Present -AT	Past -IT	Future -OT
	Mi estas instruanta.	Mi estas la instruanto.	Instruante, mi lernas.
	Vi estas instruata.	Vi estas la instruato.	Instruate, vi lernas.

ĈU (pr. *chew.*) ASKS QUESTIONS.

piano, harpo, fluto, violono, orgeno, trumpeto } estas INSTRUMENTO

rozo, tulipo, lilio, geranio, violo, narciso } estas FLORO

banano, tomato, melono, olivo, oranĝo, figo } estas FRUKTO

elefanto, gorilo, ĝirafo, kato, hundo, kamelo } estas BESTO

Let your *YES* be **JES** and your *NAY* be **NE**

LA (*The*)
tasko, piano } estas (*is*) simpla, granda
fiŝo, anekdoto } estis (*was*) freŝa, longa
progreso, raporto } estos (*will be*) rapida, favora

THE PREFIX **MAL** DENOTES OPPOSITES.
malsimpla, malgranda, malfreŝa, mallonga, malrapida, malfavora

KOLOROJ.

blanka	papero
ruĝa	inko
blua	krajono
bruna	ĉokolado
rozaj	lipoj

NUMERALS—unu, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; mil, 1000; miliono. ORDINALS: unua klaso, dua klaso, tria klaso.

PROFESSIONS shown by suffix **IST**: dentisto, harpisto, ĵurnalisto, botisto

FEMININES shown by suffix **IN**: patro patrino, reĝo reĝino, leono leonino

OFFICIAL NOTICES

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION *consists of Fellows, Members, Affiliated Groups, and Federations. The Annual Subscriptions are :— Fellows,* 21/– ; *Members,* 5/– ; *Junior Members (under* 18), 2/6 ; *Life Fellowship,* £12. 12s. 0d. ; *Life Membership,* £5. *(See prospectus).*

President : G. D. Buchanan, F.R.A.S.
Hon. Secretary : Bernard Long, B.A.
Hon. Treasurer : Arthur C. Oliver.
Acting Secretary : C. C. Goldsmith.
Propaganda Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.

NOTICE

Members of the Association are hereby informed that our Secretary, Mr. R. B. Wilkinson, is now on military service, and has been granted leave of absence from the Office accordingly; and that Mr. C. C. Goldsmith has been appointed Acting Secretary of the Association.

BERNARD LONG,
Honorary Secretary.

NEW MEMBERS IN JUNE AND JULY

Ordinary Members — Aldworth, Thomas S., *Bedwas ;* Apps, S. H., *London, S.E.*27 *;* Atkinson, Miss Isabel, *Kendal ;* Beard, Philip S. F., *Southall ;* Blackburn, Lawrence C., *Wakefield ;* French, Miss Doreen M., *London, S.E.*13 *;* Gerzsenyi, Anton, *Letchworth ;* Harris, John F., *Bromyard ;* Hartley, John, *Manchester* 19 *;* Ludmon, J. S., *London, E.*17 *;* Mathers, Miss Ada, *Blackburn ;* McCarthy, John Desmond, *Samarai, Papua ;* Miller, Thomas W., *London, N.W.*1 *;* Mitchell, F. N., *Bristol* 6 *;* Morris, Gwynne, *Neath ;* Newton, Miss Marjorie, *Blackburn ;* Page, Sidney E., *London, S.W.*8 *;* Parker, George R., *Manchester ;* Purnell, Henry W., *Cardiff ;* Reeder, Harold, *London, S.E.*13 *;* Rimington, Henry F., *Bristol* 6 *;* Schmookler, Albert, *Glasgow, C.*4 *;* Strutt, George H., *Mansfield ;* Wise, Miss Peggie A., *London, N.W.*5.

Junior Members—Crane, Frederick, *Dartford ;* Foreman, Edwin B., *Leeds* 8 *;* Jones, Thomas J., *Liverpool* 6 *;* Thomas, Philip D., *Sutton Coldfield.*

NEW AFFILIATED GROUP

Sutton and District Esperanto Club—Sec. : G. R. Primavesi, "Thrupp", Tattenham Grove, Epsom Downs, Surrey.

NEW LOCAL DELEGATE

Ipswich—FD (Propaganda)—Edgar B. Reeks, 33 Sidegate Lane West.

COMMITTEE MEETINGS

Meetings of the Executive Committee were held on April 13th, June 8th, and August 17th.

DONATIONS TO B.E.A. DURING JUNE AND JULY, 1940

General Funds—C. A. Fairman, £2. 10s. ; Miss E. Baldwin-Smith, £1 ; B. E. Long, 19/2 ; B. P. Heywood, 14/– ; G. H. Parker, A. G. Tucker, 10/– ; "Kudrilo", 5/3 ; Miss W. Pearson, 5/– ; F. W. Licence, 4/– ; P. H. Lewis, 3/3 ; D. R. T. Jones, 3/– ; R. A. Newland, 1/2 ; Miss R. J. Rees, Mrs. M. B. Melrose, J. Hartley, J. Tempest, 1/–.

Motor Car and Propaganda Fund—W. Harvey, 3/2 ; Miss G. E. Parker, 2/6.

Jubilee (Domo) Fund—Mrs. E. M. Kendrick, 10/– ; Miss G. E. Parker, 2/6.

Sustentation Fund—Mrs. Norris, 4/6.

C. C. GOLDSMITH, *Acting Secretary.*

B.E. EXAMINATIONS

Preliminary. — Edward Silverwood, *Newton-le-Willows.* *Ellis R. Benjamin, Leonard J. Tooze, *Bristol* (* *With distinction*).

EDZIĜO

Fletcher—Simpson.—Je 27 Julio, en la Metodista preĝejo, Lenton, Robert Henry Fletcher, prezidanto de la Nottinghama Esperanta Societo, kun F-ino Hilda Simpson el West Bridgford.

MORTOJ

Adams.—Je 13 Julio, 92-jara, F-ino Susanna Lister Adams, el Hastings. F-ino Adams estis la fratino ne nia neforgesebla pioniro A. J. Adams. Ŝi multe subtenis nian movadon, precipe per monhelpo al la Blindula Esperanta Movado kaj ĝia organo *Ligilo.* Ŝi kopiis multajn Esperantajn verkojn por la Esperanta Sekcio de la Nacia Blindula Biblioteko, kaj gastigis multe da blinduloj en sia hejmo ĉemara.

Bolton.—Je 31 Julio, pro voja akcidento, James Bolton, juna membro en Hoghton, apud Preston. Li estis nur 11-jara, sed tre fieris pro sia membreco de B.E.A.

Ede.—Je Julio 14, Edward H. Ede, en Cardiff, 77-jara. Li estis lerta lingvisto kaj konvinkita Esperantisto, kaj vizitis sufiĉe multajn kongresojn.

Miller.—Je 13 Julio, Elizabeth Miller, 83-jara, en Wisbech, dum 30 jaroj kunulino al Priscilla Peckover, kaj (kiel ŝi) membro de la Societo de Amikoj. Ŝi estis fervora Esperantisto, kaj dum multaj jaroj instruis la lokan grupon.

Mortimer.—Je 27 Majo, Harry Mortimer, Manchester. Dum multaj jaroj li estis membro kaj fervora subtenanto de B.E.A.

Spink.—Je 1 Majo, en Stillington, York, F-ino A. Spink. Esperantisto de 1906, ŝi estis ĉiam fervora propagandisto por nia movado.

THE BRITISH ESPERANTIST

Publishers (Eldonistoj) :
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.
HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS. *Tel. : Chorley Wood* 138

Editor (Redaktisto) : MONTAGU C. BUTLER, M.R.S.T.,
36 PENRHYN ROAD, KINGSTON-ON-THAMES, SURREY.
Telephone : Kingston 1484

RATES OF SUBSCRIPTION *(including postage to any part of the world)— Twelve months,* 2/6. *Single copies, Three Penny Stamps. (Free to B.E.A. members).*

ADVERTISEMENT RATES *will be quoted on application to the Secretary of the B.E.A.*

MANUSCRIPTS *should be typewritten, and addressed to* THE EDITOR. *The Editor does not hold himself responsible for loss or damage, nor does he undertake to return manuscripts unaccompanied by a stamped addressed envelope. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned. He reserves the right to refuse, correct, or shorten contributions received. Matter should be received by the 8th of the month.*

JARABONO : 3 svisaj frankoj. Unuopaj ekzempleroj : po 30 centimoj (aŭ unu respondkupono).